

# ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

**Redaktejo** : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

**Administrejo** (abonoj, ktp.) : E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M-et-L.), Francio.

**Eldonejo** : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

## Potencigo de nia Agado

Jen la sepa numero de I.P.R. Nun venos la feria paŭzo kaj la sekva kajero eliros nur en Oktobro. Estas momento pripensi nian agadon!

Fakte ni povas diri ke nia Revuo estas internacia « libera tribuno » de la edukistoj. Aliparte ĝi respondas al efektiva bezono kaj tio montriĝas interalie per tio ke via redaktoro ĉiam trovis tujan pretecon kaj koran akcepton ĉe liaj petoj pri verkado. Ĝenerale oni respondis eĉ pli bone ol li esperis. Mi do povas garantiĝi interesajn artikolojn por la venontaj monatoj. Krome mi estas certa, ke ĉiu aŭtoro plu verkos por gazeto kiun li sentas sia. Jam multaj leteroj de legantoj venis kaj portis laŭdojn : tiuj laŭdoj plene apartenas al la aŭtoroj kaj kunlaborantoj. Sen ili I.P.R. ne povus ekzisti.

Nu, ni jam povis diri ke I.P.R. boris sian vojon kaj konkeris estimindan lokon en la koncerto de la esperanta gazetaro. Ĉiu leganto konsciis pri tiuj faktoj kaj helpu plibeligi kaj pligrandigi nian kolektivian kreaĵon.

Por tio pluraj rimedoj estas je dispono : propagandi nian revuon en pedagogiaj naciaj revuoj, en esperantaj gazetoj, en esperantaj kongresoj kaj kunvenoj ; ĉiam trovi novajn abonantojn ; adopti legantojn el nepagipovaj landoj, pagante abonojn por ili ; donaci al la kazo de I.P.R., k.t.p... Ĉiu agu laŭ sia emo kaj eblo. Ĉiuj kune ni certe sukcesos.

Sed tio estos « interna », plej necesa agado. Mi estas certa, ke ĉiu el vi intencas fari la maksimumon en tiu direkto, kaj li faros ĝin. Tamen tio apenaŭ sufiĉas por Esperanto. Necesas « ekstera » agado.

Efektive preter nia revuo estas la tuta movado, la tuta celado esperantista. Kaj vi, karaj geamikoj, povas majstre labori por Esperanto en la pedagogiaj medioj, tiuj ŝlosilpozicioj por enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn ! La rimedojn vi trovos mem, sed mi volas atentigi pri unu — du.

Mi spertis ke estas gravege, se ni povas persvadi ne-esperantiston verki por esperanta gazeto faka. Ja estas agrable por ĉiu « esti presita » ; ankoraŭ pli en internacia gazeto. Sed precipe kaj samtempe estiĝas tre persona kontakto kun Esperanto : la ne-esperantista aŭtoro tiel sentas sin iel ligita al nia movado. Pripensu tiun eblon, kaj, se vi konaŝ iom gravan personon, ek ! Al agado !

Alia rimedo estas jena : nacilingven traduku, sed en ege korekta lingvaĵo, artikolojn el I.P.R., aperigu ilin en la pedagogia gazetaro vialanda. Tiel, multaj praktike konatiĝos kun Esperanto : nerekte, ili komprenos ke temas pri vera kulturlingvo, neniel pri elementa kodo, kiel tro multaj opinias.

Elektu artikolojn, kiuj plaĉis al vi, traduku kaj sendu al bona gazeto kiun vi kutime legas kaj kiu publikigas samspecajn artikolojn. Serioze traktu la aferon, vi certe sukcesos.

Kuŝas en nia movado multaj latentaj fortoj. Ni sciu ilin potencigi.

Andreo ALBAULT.

# INFORMOJ

## INTERNACIA TAGO DE INFANO VERE INTERNACIA

50 infanoj de la Pestalozzi-lernejo en Freital (Dresden) depost kelkaj monatoj korespondas kun infanoj de la tuta mondo. Ili forsendis ĝis nun 75 leterojn kaj poŝtkartojn. Ĝis nun alvenis 60 leteroj ktp. Okazas ankaŭ intersaĝo de infandeseĝoj kun aliaj lernejoj. Alvenis sendaĵoj el Anglio, Francio kaj Hungario, alvenos el Japanio, Koreo, Danio, Italio, Jugoslavio kaj Sovjetunio.

Eksterordinaran ĝojon havis instruistoj kaj infanoj, kiam antaŭ nelonge atingis nin letero de la Klement-Gottwald-lernejo en Dolnich-Bludovicich (Ostrava, CSR), subskribata de la direktoro, pionirgvidantino kaj gimnastik-instruisto. Estas dirate en ĉi-tiu letero :

« La 1. junio estas la « internacia tago de la infano ». La infanoj de nia lernejo festos tiun tagon kaj por ke ĝi estu vere internacia, ni proponas al via lernejo, realigi dum tiu ĉi atgo malpezatletikan matĉon inter niaj lernejoj. Oni vetbatalos en malpezatletika tribatalo, kiu enhavas kuro je 60 m, longsalton kaj jeton de kriketa pilketo. Ĉiu lernejo vetbatalas sur propra sportludejo. Ĉiun lernejon reprezentos 10 knaboj kaj 10 knabinoj, naskitaj en la jaroj 1942 kaj 1943. Ĉiu el ili kuros saltos kaj jetos. Iliaj plej bonaj rezultatoj estos poentotaj. Por la fina rezulto de matĉo oni kalkulas rezultojn de la 6 plej bonaj knaboj kaj knabinoj. Oni poentos laŭ la ĉeĥoslovakia malpezatletika poenttabulo por gelernantoj. Poentado faros nia instruisto de gimnastiko kaj rezultojn ni poste sendos al vi. Tiu ĉi letero estas sendita al 12 lernejoj de la tuta mondo. Se via lernejo intencas partopreni ĉi tiun matĉon, sendu tuj aliĝilon, ĉar ni volas anonci ĉi tiun internacian matĉon en Ĉeĥoslovaka gazetaro kaj radio-stacio.

Ĉi tiun matĉon efektividu la 1. de junio dum la « Internacia tago de infano ». Ni petas vin, ke tuj post finigo de vetbatalo vi sendu al ni rezultojn de via lerneja teamo. Skribu nomojn de vetbatalantoj, ilia naskjaro, indiku sekson kaj la atingitajn rezultojn en kuro, salto kaj jeto, por ke nia instruisto de gimnastiko povu plej frue poenti ĉion kaj starigi finan rezulton de matĉo. Finan rezulton oni sendos al vi kiel eble plej baldaŭ.

Samtempe kun ĉi tiu sciigo ni petas vin, priskribu efektividon de la matĉo sur via sportludejo. Ĉu partoprenis ĝin direktoro de via lernejo kaj instruistaro, ĉu partoprenis gelernantoj de la tuta lernejo kiel rigardantoj, ĉu via sportludejo estis ornamita, kiu ankoraŭ portoprenis ktp., ktp. Se eble, sendu fotografaĵojn de ĉi tiu matĉo, de teamoj, ktp.

Ni esperas, ke via lernejo certe partoprenos kaj ke vi tiamaniere kontribuos al vere internacia tago de infanoj. Ni esperas, ke ni ĉiuj helpos al interfratiĝo de niaj nacioj kaj al plifirmigo de la paco en la tuta mondo. Per Esperanto por la mondpaco! Vivu, vivu paco en la tuta mondo! »

Nia lernejo ĝoje akceptis la proponon de la ĉeĥoslovakia lernejo kaj efektividigos la « Internacian tagon de la infanoj » en ĉi tiu

formo. La tuta korespondado de la infanoj kaj inter la lernejoj estas farata per helpo de kolego Leichert en Esperanto.

## LENINGRADA DOMO DE KULTURO DE INDUSTRI-PRODUKTADA KOOPERO

(22, Kirovskij prosp., 42, Leningrado) cele al la 6-a Tutmonda Junulara Festivalo en Moskvo (1957) organizis amatoran koncertan ensemblon, kun partopreno de pli ol cent gejunuloj : muzikistoj, kantistoj, ĵonglistoj, ktp... kaj proponas jam nun interkonatigi per Esperanto, individue aŭ kolektive korespondadi, intersaĝi kantojn, muzikaĵojn, ktp. la leningradaj junuloj deziras rompi la baron de diverslingveco kiun ili spertis en antaŭaj festivaloj.

## INTERNACIA KONFERENCO DE ESPERANTISTAJ STUDENTOJ

(Ljono, 21-24 Julio 56). Adreso : Studenta Esperanto-Grupo « Jules Verne », 7, rue Major Martin, Lyon. Programo : Fakaj kunvenoj prelegoj, filmo, oratora konkurso, ekskurso, balo.

## XVII-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

(Barcelono, 25-29 Julio 1956). Aliĝo de nehispanoj senpaga. Adreso : « Stelo de Paco », Str. Teruel, 26-28, Barcelono (12), Programo : laborkunsidoj, prelegoj, Esperanto-Ekspozicio, vizito de barcelonaj muzeoj, ekskurso al montaro « Montserrat », koncerto de horoj kaj regionaj dancoj, teatra prezentado, literatura konkurso, oficiala bankedo, internacia balo. Ni tre rekomendas tiun kongreson interalie al sudfrancoj.

## CEJLONO KAJ BUDAISMO

En Cejlono ekzistas favora fluo por Esperanto. Ni ne forgesu ke la tiea oficiala lingvo estas ankoraŭ la angla. Tio devenas de la klopodoj de S-ano C. Nyanasatta, estro de la « Budhana Esperanto-Instituto, Verda Ermitejo, Kolatenna, Bandarawela, Cejlono. Okaze de pretigo de « Budhana Enciklopedio » nia samideano estis komisiita pretigi ĉiujn artikolojn pri Esperanto, E-o kaj Budhismo, kaj pri Budhismo en landoj kie la angla ne povos helpi. Helpu lin kolekti materialon ĉefe pri jenaj landoj : « Hungario, Jugoslavio, Rumanio, Bulgario, Grekujo, Pollando, Eŭropa Sovetio, Latvio, Litovio, Estonio. »

## ESPERANTO EN LA GAZETARO

En « Skolske Novine » (Lerneja Gazeto), n° 19 de 11-Maj 56, Branimir Pipinic, instruisto de 8-jara popollernejo en Hraščina (Kroatujo), en kiu Esperanto estas instruata kiel deviga objekto, raportas kiel liaj lernantoj lernas geograflon el la skribaĵoj de siaj eksterlandaj esperantaj amikoj. Tiel estis studataj : Islando ; Javo ; Gakarto, Indonezio ; Tokio, Japanujo ; Aŭstralio ; Svislando ; Biskaja Golfo, Francujo ; Britio ; Amsterdamo, Nederlando ; Svedujo ; Germanujo ; Aŭstrio ; Italujo kaj Grekujo. Ili ricevas ne nur priskribaĵojn, poŝtmarkojn, desegnaĵojn kaj bildojn, sed ankaŭ valorajn  
(fino sur p. 83)

F. Nowljan

# PEDAGOGIA AMO

En diversaj lingvoj ja aperis romanoj pri lernejoj, pri interrilatoj inter geinstruistoj kaj gelernantoj, sed malmultaj poeziaĵoj, ĉar la laboro en la lernejo, pli malpli rutina, ne inspiras poetojn — eĉ se ili estas edukistoj — kanti pri ĝi. Tamen, rigardata el socia vidpunkto, ĝi prezentas multe da materialo por poezio. Tion pruvis angla kaj esperanta poetino, Marjorie BOULTON, en sia ciklo da 28 sonetoj : « *Trista tenereco* » aperinta en la kolekto « *Kontralte* » (1).

*Mi lernas kelkajn trajtojn, kelkajn emojn,  
Komprenas ian timon per indiko  
Malgranda, helpas, helpi plu deziras,  
Komencas kompreneti la problemon  
De ĉiu malsimila, fremda nsiko ;  
Finiĝas kurso. Ili jam foriras.*

Tial la titolo « *Trista tenereco* » de la ciklo, en kiu la trista lektorino, virino kaj poetino, en 392 versoj diris al ni mullege pri si mem kaj pri siaj studentinoj en virina kolegio, laboro kaj vivo en ĝi, pri la problemoj de instruado kaj edukado.

*Mi ŝin rigardas. Eble mi duone  
Ridetas pro normala homa em'  
Konata. Mi rigardas, minacbrove,  
Mi skribas noton. Diras mi impone  
Al ŝi, samtempe, eble, al mi mem :  
« Ne gravas. Sed ne faru ĝin denove ! »*

Jen bildo pri sceno, kiu tiel ofte aperas en ĉiuj lernejoj de la mondo, sed kiom malmultaj instruistoj, riproĉante siajn lernantojn, riproĉas ankaŭ sin mem ?

*Kaj mi trankvila, sidas kaj rigardas  
Klinitajn kapojn kaj krablantajn manojn.  
Laŭ mia devo nun mi ekzamenas  
Ilin. Sed simpatio ilin gardas  
Kaj mia kor' tamburas akompanojn ;  
La timojn mi komprene partoprenas.*

La poetino en sentoj formas unu unuecan kolektivon de ekzamenatoj kaj ekzamenantino, ĉar :  
*Eduko ĉiam estas tragedio ;  
Neniam ni atingos nian celon,  
Ni malperfekte trafas la oreleon  
Per nia propra malperfekta scio.*

Kiom da modesteco kaj memkritiko entenas ĉi-tiuj sinceraj versoj ? Jes, la ekzameno de niaj lernantoj estas ankaŭ ekzameno de ni mem !

(1) Marjorie BOULTON. « *Kontralte* ». Eldono « *Stafeto* », La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955, 286 p. (Vidu p. 17-31).

*Mi pensas pri malsatego psika  
De junulinoj, apetito kora —  
Kiel malriĉe ilin mi manĝigas !  
.....*

*Mi donas amon en senlaca ado  
En mia homa stato simpatia,  
Kaj eble tiel mi disdonas ĉion.*

Se la scio estas malperfekta, se ŝi ne kapablas al la junulinoj doni sufiĉe da konvena spirita nutraĵo, la poetino donas al ili amon. Ĝi estas samtempe patrina, fratina kaj instruistina amo, ĝi estas — pedagogia eroso (\*).

— *Ho, mia korosanga ruĝa lumo  
Estu por ĉiu, bonveniga stelo !*

Eduki signifas krei, krei homon ; sed kreado sen koro kaj amo ne estas ebla :  
*Valoras oceano pli ol karto —  
Kaj tiel floras ĝlora antilezo ;  
Homo kaj homrilatoj iĝas arto !*

Agorditaj kordoj resonas pro sama tonoj :

*Mi diras : « Kara, ĉu vi eble scias  
Ke mia propra vivo tre malplenas  
Kaj estas fuŝo — kiel vin konsoli  
Kapablas mi ? » La studentino krias :  
« Ne sciis mi, sed iel mi divenas ;  
Pro tio povas mi kun vi paroli ».*

Ni estas, eble, tro severaj al ili :

*Mi pensas : « Kiel bone, laŭ la aĝo,  
Ili strebas, per malgrandaj fortoj !  
Kia laboro ! Kia bonintenco ! »*

Pro tio :

*Eble mi povas studentinojn sproni  
Al pliboniĝo, kaj konsilojn doni,  
Sed ne per vort' tro akra kaj korekta,  
Nek per vizag' kolera, nigraspekta ;  
Mi lasu ilin kreski kaj burĝoni !*

La sonetoj ne estas didaktika poezio, sed tamen la poetino en ili donas al ni valorajn didaktikajn instrukciojn, kiel montras la supraj versoj. Si vere prezentas sin mem, sed ŝi estas personigo de la instruistoj. En ŝiaj versoj tie kaj tie ni rimarkas nin mem. Si donas kompletan

## SINCERA KONFESO

adresita al

*Internacia Pedagogia Revuo*

Inter tiuj, kiuj min alridis,

Pli ol vi amindan mi ne vidis,

Sed, ho ve, ĉar estas mi senmona,

Kontentiĝu per ador' platonaa...

7-5-1956,

M. LUKAS

bildon de la kolektivo, kiu nomiĝas lernejo. Ĝin unuigas la pedagogia eroso.

*Orgio de mansakoj kaj valizoj,  
Kaj for, nun for el kolegiaj bridoj,  
— Amuzaj estas ĉiuj ĝoj-avidoj!  
For al diversaj etaj Paradizoj!*

Jes, ili foriris, sed kun si forportis parton de ni, ankaŭ ĉe ni ili lasis parton de si mem. Estis la amo, speciala amo, pedagogia erotiko, kiu ligis nin. Nun ĝi dispartiĝis, sed ne mortos. Mi rigardis ilin, miajn ekslernantojn, kun kia emocio kaj ĝojo ili alproksimiĝadis al mi ĉe hazarda renkontiĝo. La sama emocio kaj ĝojo kaptis min. Mi aŭskultis ilin, jam grizharajn kaj ankaŭ emeritajn; kun kia amo kaj dankemo, super la tombo de ilia foririnta eksinstruisto, ili adiaŭis lin. Mi legis la nekrologojn, kiujn ili verkis pri siaj eksinstruistoj. La pedagogia eroso postvivis la tombon.

*Sed poste, jes, mi ĝojos en sekreto,  
Kiam la studentina hord' revenos.*

Nia sorto : ĉiujare ni adiaŭas niajn ekslernantojn, sed jam ĝojas, ke, komence de la venonta lernejararo, ni ricevos novajn, novajn objektojn de nia amo kaj de niaj zorgoj, novajn kunlaborantojn.

*Ni nin klerigas kune, vi kaj mi.  
Mi estas nur gvidisto sur deklivo  
Krula, kun ŝnuro kaj kun montbastono ;  
Ni kune supreniras, kune strebos ;  
La strebo daŭros dum la tuta vivo ;  
Ni staros sur la monto de la kono  
Alte, kaj vastaj altoj superŝvebos.*

Jen la bildo de la moderna instruisto !

Kiel emerita direktoro de okjara mezlernejo (gimnazio) mi treege bedaŭras, ke Marjorie BOUTON ne instruas en mezlernejo, kien venas infanoj kaj de kie foriras maturaj viroj kaj virinoj. Se ŝi havus la okazon observi la evoluon de tiuj junaj homoj kun ĉiuj impresoj, emocioj, sentoj, konfliktoj kaj ĝojoj en lernejo, kian epopeon ŝi donacus al ni kaj al la mondo ?

Sed kial postuli pli ? Ni estu feliĉaj, ke ni havas la valoregan sonetociklon « Trista tenereco ». Ni estu feliĉaj, ke ni fine havas lernejan poëtionon.

(\*) **Gloso** : La neologismo *eroso*, kiu signifas finfine nur *amo*, ŝajnas al ni tute superflua. Krome ĝi tro similas al *eroto* (aŭ *erotiko*, formo ankaŭ uzata samsignife en la sama teksto). *Eroto*, sametimologia, tro elvokas *seksamon*, *amoron*. — Red.

K.I.M.I.L.

## PRI FIDO AL LA INFANOJ <sup>(1)</sup>

Kiam estis publikata nia unua artikolo, neniu leganto havis tempon por respondi al niaj demandoj.

Sed fine de « Nia Diskutejo » (I.P.R., p. 40), ni legas : « Estus interese koni la opinion ankaŭ de nebritaj instruistoj pri tiuj problemoj ».

Kiu estis la temo ? Marjorie BOUTON diris ke necesas « montri fidon al la infano » ; al kio Reto ROSSETTI respondis : « Oni ne nur devas MONTRI, AFEKTI fidon, sed vere HAVI fidon al la infano ». M. BOUTON fine rimarkigis ke nune la plej multo de la instruistoj ne havas eblecon elekti ĉu ili havu fidon aŭ nur montru ĝin, sed ĉu severe puni, aŭ kontraŭe montri fidon al la infano.

Ni donos ĉi-tie la opinion de la anoĝ de la Koperativa Instituto de Moderna Internacia Lernejo (K.I.M.I.L.), kiuj ĉiam praktike elprovis, por ilin kontroli, la

jam konatajn principojn, kaj tiel eltrovis novajn. Car, teorie, povus daŭri la diskutado senfine kaj senrezulte !

La demando ne estas : « Ĉu ni havu fidon al la infano ? », sed : « KIEL ni faru por povi fidi al la infano ? »

La rusa praktikanta pedagogo MAKARENKO diris ke oni ne povas fari per *parola* konvinkado. Tio estas ankaŭ la penso de la KIMILanoj

Ni ĉiuj konstatis ke estas preskaŭ neeble havi la fidon de ĉiuj infanoj de nia klaso kun kutimaj metodoj. Eĉ se la instruisto estas tre « afabla » kaj « amata » de siaj lernantoj, li apenaŭ eliris kaj forlasis ilin ke tuj la laborado ĉesas. Ni ne diru kio okazos poste.

Kial ? Tial ke fakte ekzistas nenia demokratio en la lernoĉambro ! Iuj « progresemluloj » starigis, « kun la konsento de la infanoj, kiuj balotis », regularon kiu permesas « konservi la ordon ». Sed kio do fakte okazas ? Okazas ke kiam la Estro forpaŝis, li estas anstataŭata de unu aŭ pluraj denunculoj. Ĉu tio estas preferinda ? Vi mem diskutu pri tio. Sed ni opinias ke UNUE ni de-

1) Responde al Marjorie BOUTON kaj Reto ROSSETTI (Vd I.P.R., 1956 n° 2 p. 15 kaj n° 4 p. 40).

vus klare vidi ĉu ekzistas rimedoj por havigi veran interfidon!

La problemo kuŝas en ORGANIZADO DE LA TUTA KLASLABORO.

Vere, la Kimilanoj ne havis precize tiun solan celon: interfidon, sed tiun ĝeneralan celon: KIEL ADAPTI LA METODOJN DE EDUKADO AL LA NOVA EVOLUANTA MODERNA VIVO? Ili fine trovis diversajn rimedojn, kun la helpo de la unua el ili: FREINET (pr. Frene'). Poste, ili devis organizi la diversajn instruteknikojn per la laborplanoj ktp.

Iom post iom fariĝis la vivo de la infanaro pli entuziasma, kaj tute nature la interfido pli profunda.

La infanoj estas koraj kaj scivolemaj personoj. Oni povas ilin « prepari al la vivo » nek per moralaj paroladoj, nek per artifikaj rimedoj, nek per belaj promesoj: « Vi estos estonte pli feliĉaj, se vi nur lernas kun peno », t. e.: « Vi devas nun suferi por akiri paradizon ».

Sed ĉu la saĝaj gepatroj finakiris la paradizon?

La lernantojn ni konsideru kiel infanojn, kiuj simple volas NUN intense vivi, eĉ kun la riskoj de ĉiu reala vivo. Ne la libroj, sed la vivo estu la centro de nia laborado.

Nenia demokratio estas ebla per sola ekstera regularo. Ĝi povas esti nur LABORdemokratio.

La unua kondiĉo de interfido estas demokratia vivo. La demokratio povas ekzisti nur en la kerno mem de la laboro, POR la organizado komuna de la laboro de ĉiuj. Tiu demokratia organizado de la laboro povas esti nur organizado de SOCIA laboro. Kaj aliflanke la infana laboro (kiel ĉies laboro) povas esti nur tre interesa se ĝi estas humana, SOCIA.

Tio estas demando de METODIKO.

Kion faras la dekmiloj da kimilanoj de Eŭropo, Afriko kaj Sudameriko?

1) La infano, eĉ la etulo, korespondas kun persona amiko, kaj al li (aŭ ŝi) sendas desegnaĵojn, leterojn, objektojn, poste studojn, raportojn, demandojn, respondojn al dokumentaj demandoj, ktp.

La infaneto korespondas antaŭ ol lerni skribon kaj legadon, ĉar tia estas la vivo ke unue ekzistas la bezono, kaj poste la deziro plenumi tiun bezonon!

Li tiam komprenas KIAL kaj POR KIO li volas lerni skribadon kaj legadon; li komprenas, SENTAS tion. Sed fakte la metodo devas esti tute nova: socia kaj natura metodo.

2) Por infanoj pli aĝaj ekzistas ne nur persona korespondado, sed KOLEKTIVA. La tuta infanaro korespondas kun aliaj klasoj de sama klasgrupo. Tiucele estas

Via redaktoro pro aparte prema laboro, tre malfruiĝis en sia kuriero kaj petas pardonon de la aŭtoroj kaj aliaj korespondantoj al kiuj li ankoraŭ ne povis respondi. Sed ĉiu ricevos respondon.

necesas la gazeto kaj la presilo. Ĉu tion ne faras la plenkreskuloj? En la klasgrupo estas klasoj de diversaj regionoj.

Tiel la infano komprenas la intereson de geografio, scienco, ktp. Li volas ĉiam pli scii, li ĉiam pli demandas. Kaj ni estis devigataj eldoni dokumentajn broŝurojn pri multaj temoj (nun pli ol tricent) por respondi al la infana intereso. Tio estas jam vasta infana (kaj neinfana!) enciklopedio.

Ni ja ne povas rakonti pri ĉiuj novaj instruteknikoj en unu artikolo! Ni havu ankaŭ individuajn lernilojn kiam estas necese. Sed la tuta infanaro pridiskutas pri ĉio, precipe pri la laboro farita kaj farota, eĉ pri la individua laboro de ĉiu.

Ĉio ĉi neprigas novan modernan materialon. Kaj la ekzisto de tiu komuna materialo necesigas organizadon de ĝia uzado. La organizado necesigas diskutadon, kaj komunan decidon. La antaŭa diktatoro-instruanto baldaŭ fariĝas la kara granda kamarado-edukisto, kaj tiu ĉi ofte devas respondi al la demandoj de siaj lernantoj: « Mi ne scias, Ni kune serĉos. »

Sed mi devas nun konfesi ke multaj kimilanoj forgesis ion: instruadon de moralo. Tial ke la tuta vivo nun eĉ ili fariĝis morala.

Ni do ne pripensu kaj diskutadu teorierie pri tiu aŭ alia metodo kiu lasos la demandon apenaŭ solvita.

Ni praktike provadu, komparu niajn eksperimentadojn: la sperto de unu servu la aliajn.

Ĉar kiam la klasa medio fariĝis humana, pere de kunlaborado, dank' al nova pedagogia materialismo, ankaŭ klariĝas, solviĝas moralaj problemoj.

Roger LALLEMAND.

(Por tiu rubriko, skribu al mia adreso: Fromelennes (Ardennes), Francio).

Okaze de sia elekto kiel komitanto B de U.E.A., D-ro Andreo ARBAULT, kore dankas ĉiujn U.E.A. delegitojn, kiuj voĉdonis por li.

20-a leciono

## POR LA PRAKTIKANTOJ

### UNUA TEKSTO

Ciujare, la 15-an de Decembro, la esperantista grupo kunigas por celebri la datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Tiukaze la prezidanto de la grupo parolas pri la vivo de la kreinto de Esperanto.

Petro atente aŭskultas la paroladon de la prezidanto. Tra liaj vortoj li vidas la junan Ludovikon, lian severan patron, lian dolĉan patrino kaj liajn gefratojn. Kun ili, li vivas en Bjalistok kaj en Varsovio. Kun Ludoviko Zamenhof li iras al la lernejo kaj suferas pro la konstantaj bataloj, kiuj okazas en la urbo. Kun li, li serĉas solvon, kiu ebligus al la batalantoj interkompreniĝi, ellaboras la internacian lingvon, esperas, malesperas, suferas en sia korpo kaj animo. Kiel granda estis la amo de Zamenhof por siaj ĉiulandaj fratoj! Nun Petro bone komprenas kial Esperanto estas tiel ŝatata de tiuj, kiuj ĝin uzadas: ĉiu esperantisto partoprenas en tiu amo.

Reveninte hejmen, Petro rakontas al sia patrino, kion li aŭdis: « La vivo de Zamenhof estas kvazaŭ fabelo. Li vivis en malgranda lando, kiun suferigis potencaj najbaraj nacioj. En tiu lando, la loĝantoj malamis unu la alian pro la diverseco de lingvoj. Meze de la kruelaĵoj vivis la knabeto bonkora: li frue komprenis, ke, pro tio ke ĉiuj homoj estas « kreitaj laŭ unu modelo » kaj havas egalajn ĝojojn kaj suferojn, ili devus interkompreniĝi. Kaj en lia kapo ekkreskis la ideo: « Mi devas trovi rimedon por ĉesigi tiujn sangelverŝadojn. » Ĉar bona feino donis al li genion, li sukcesis disponigi al la homaro Esperanton. Sed la bela fabelo fariĝis dramo. D-ro Zamenhof la tiel bonkora kaj modesta viro suferis, ĉar malgraŭ liaj penoj kaj esperoj la homoj denove interbatalis. Lia karega urbo Varsovio estis detruita » — « Jes, respondis la patrino, sed li neniam dubis pri la estonteco de la internacia lingvo. Ni devas ne nur uzi ĝin kaj propagandi ĝin profite al la homaro kal al ni mem, sed ankaŭ ami ĝin memore de la grandanima knabo kaj de la respektinda geniulo. Petro mia, uzu la internacian lingvon ne nur por interŝanĝado de poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj sed ankaŭ por kompreni alilandanojn kaj ami ilin. »

### DUA TEKSTO

(D-ro Zamenhof parolas pri eventoj okazintaj en lia urbo).

« En la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo, sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin jetis, kiel plej krue-laj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion al tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj...

« Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj plej ruzaĵ kaj plej malnob-laj rimedoj, per amase dissemitaj mensogoj kaj kalumnioj, arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komu-nikiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de aliaj gentoj estas tute tiaj samaj homoj, kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia? Rompu, rompu la murojn inter la popoloj! »

Tiel paroladis Zamenhof en 1906 dum Kongreso en Genevo. Preskaŭ la samon li jam pensis estante bonkora knabeto en Bjalistok. Doloris li pro la fremdeco inter loĝantoj de la sama urbo. Doloris li pro la malamoj en la tuta mondo. En lia pensema kapeto formiĝis jam plano kaj volo, ke « pli malfrue », kiam li estos « grandaĝulo », li nepre forigos tiun ĉi malbonon.

(El « Vivo de Zamenhof »,  
de Ed. Privat.

### RIMARKOJ

La naciaj lingvoj estas riĉaj je pasinteco, riĉaj je la historio de popoloj, kiuj kuniĝis uzante ilin aŭ kuniĝinte uzis ilin. Esperanto, kies historio estas ankoraŭ mallonga, estas riĉa je la amo kaj sindonemo de viro, kiu kredis en paca estonteco kaj metis sian koron kaj sian animon en ĝin. Pro tio Esperanto vere vivas ĉar ĝi ne estis arte farita el spirito genia sed elŝprucis el konfido kaj profunda deziro helpi la homaron. Ĝi ne



*Dr. L. L. ZAMENHOF, aŭtoro de Esperanto*  
(15 Dec. 1859 - 14 Apr. 1917)

estas la kuniĝilo de nacioj sed de mondanoj. Ĝi estis la elpenso de grandanima homo, kiu sopiris al mondskala feliĉo kaj nun estas la esprimrimedo de homoj, kiuj deziras disrompi la barojn, kiuj ilin apartigas de iliaj translimaj fratoj.

Oni malbone konas Esperanton, kiam oni ne studis ĝian historion kaj ĉefe la vivon de ĝia kreinto. Oni devas studi lian vivon kaj koni liajn pensojn kaj instruojn per la legado de liaj verkoj.

### EKZERCOJ

#### 1. — *Demandoj* (1-a teksto) :

— Kial la 15-a Decembro estas ĉiujare celebrata de la esperantistoj ?

— Kie kaj kiam vivis D-ro Zamenhof ?

— Ĉu lia vivo estis senzorga ?

— Kial li kreis la internacian lingvon ?

— Ĉu li estis feliĉa ĉe la fino de sia vivo ?

#### 2. — *Demandoj* (2-a teksto) :

— Kiu estis la kulpo de la atakatoj ?

— Kiu estis kulpa je la abomenindaĵoj ?

— Kiel ili kreis tian malamon ?

— Kial la diversaj gentoj malbone konas unu la alian ?

— Kion oni devas diri al ili ?

3. — Legu la « Vivon de Zamenhof, de Edmond Privat, kaj skribu la diversajn ĉefajn okazaĵojn, bonajn aŭ malbonajn, en la vivo de la Majstro.

### EKZERCOJ DE LA 19-a LECIONO

#### 1. — *Demandoj pri la 1-a teksto* :

— Petro estis senpacienca, ĉar li atendis sian patron, kiu revenis de la Universala Kongreso en Bolonjo.

— Unue, Petro demandis sian patron pri la nombro de la partoprenantoj kaj pri la personoj, kiujn li renkontis.

— Ne, lia patro ne renkontis sian ĉehan amikon hazarde sed pere de la rendevua tabelo.

— Kiam kongresano legas sian numeron sur la tabelo li turnas sin al la deforanto ĉe la ĝiketo kaj ricevas leteron de alia kongresano.

— La patro promesis al Petro viziton al Kopenhago, ĉar li vidis lin revema kaj li sentis lin sopiranta pri vizito al Universala Kongreso.

#### 2. — *Demandoj pri la 2-a teksto* :

— La parolado temas pri la disiĝo de la homa familio. Dank' al Esperanto oni nun povas esperi, ke la homa familio rekuniĝos.

— Kutime gefratoj helpas unu la alian kaj laboras kune por la feliĉo de sia familio.

— La tempo pri kiu la poetoj revadis estis « nebula » ĉar ĝis la apero de la lingvo Esperanto oni nur « revis » pri la rekuniĝo de homoj en unu familion. Oni ne antaŭvidis la rimedon por tion realigi.

— Okazis vera miraklo en Bulonjo-sur-Marco, ĉar por la unua fojo homoj el la plej diversaj landoj kunvenis, komprenis unu la alian kaj parolis, kiel fratoj.

3. — *Klarigu* : elviŝigi : iĝi elviŝita, kompltee forigi.

*Disiĝi* : iĝi disaj, malkuniĝi.

*Kuniĝi* : iĝi kunaj, interrilatiĝi.

*Mute* : ne posedante la parolkapablon.

*Surde* : ne posedante la aŭdokapablon.

4. — En tiuj frazoj D-ro Zamenhof uzis la akuzativon por montri ŝanĝigon de stato, aliĝon.

### SOLVO DE LA KRUCVORTOJ N° 5

Horizontale : 1. Kotiledono ; 2. Skio, trui ; 3. Iru, ag, orf ; 4. Lo, areo, aa ; 5. Skerco ; 6. Ostaro ; 7. Re, oine, do ; 8. Amo, ti, are ; 9. Fari, krud ; 10. Interpreti.

Verikale : 1. Ksilografi ; 2. Okro, eman ; 3. Tiu, so, ort ; 4. Io, akso, ie ; 5. Apetto ; 6. Gerani ; 7. Dt, ocre, kr ; 8. Oro, oo, are ; 9. Nura, drut ; 10. Oifargoedi.

### Kultura intersango

Supera pedagogia lernejo en Banja Luka, Jugoslavio, dezirus *intersangi* kompletan ĉi-jaran urban ekspozicion de infandeseĝnaĵoj kontraŭ samspeca ekspozicio ali landa. Ĝi proponas 120 akvarelaĵn desegnaĵojn de 100 aŭtoroj 11-14-jaraĵ. Nur seriozaj kontaktoj dezirindaj. Skribu al prof. Miroslav Vrabc, Banja Luka, Viŝa pedagoga ŝkola, Jugoslavio.

Ni dankas la « Gimnazian Esperanto-Rondon » de Vasvar en Hungario, kiu donacis la numerojn 4 de 6a jaro kaj 11-12 de 7a jaro de la Internacia Pedagogia Revuo de TAGE.



# Sugesto kaj morala Eduko

Kiam mi legis la artikolon de Marjorie BULTON, mi juĝis ĝin kiel tezon inter aliaj, ne intencis skribi pri tio. Sed post la rikoj de Reto ROSSETTI, kaj la demando la redaktoro, mi pli klare vidas kion mi devas alporti al la petata debato (I.P.R., 6. p. 15 kaj 40).

Ĉi ne bone konas la edukajn metodojn Britio, sed de kiam mi estas esperantisto, renkontis nur britajn edukistojn favoral la novaj metodoj, al la libero de la metodoj, ktp... Tiuj edukistoj batalas laŭdikontraŭ la Viktoriaj moroj (moralo de la reĝino Victoria) kiuj subpremas la infanojn, sklavigus ilin... Kiel Franca proleta familio, mi neniam konis tiun ĝan anglan moralon; mi neniam sentis mi sklavo, sed mi multe aŭdis pri la novaj metodoj en moralo. Mi ofte konstatis ke metodoj de instruistoj, edukitaj laŭ la novaj metodoj estas tre malbone edukitaj. Mi ne povas konkludi ke la principoj estas malaj, sed ke ili ne ĉiam kaj ĉie estas valoren ĉiuj situacioj.

Ĉi M. BOUTON, se mi komprenis ĝin, la metodoj estas bonaj sed eraras. El tio, oni povas konkludi ke la aŭtorino juĝas la konceptojn malbonaj, sed kredas pri la boneco de infana naturo. Ĉu ŝi kredas, aŭ ĉu estas ŝi, tion mi ne scias, ĉar por praktiki tiuj metodoj nur necesas ŝajne krei la boneco de la naturo infana. Sugesto de BOUTON rimedo pli ol metodo, estas sintenado de la praktika pli ol filozofa.

ROSSETTI tuj vidas tiun mankon laŭ la vido, li substrekas la eblecon pri hipokriteco, sed laŭ mi, li iras pluen la vojo al kredo pri infanoj. Eĉ sence, tiu sugesta metodo povas kredi pri la boneco de infano sed opinii necesa iun plenkulan influon ne diskutatan. La infano estas bona sed ĝi estas blinda kaj devas fidi la konsiloj de la edukistoj. R. ROSSETTI kredas por la infano la rajton ribeli, defendi la motivojn, li malfermas pordon al praktiko de la infano, li antaŭvidas debaton kie la infano kreskulo ne estas juĝisto sed advokato de la socio.

Ĉi persone, mi bezonas plilarĝigi la debaton, ĉi unua demando kiun mi studos estas : *Ĉu estas malbona konduto?* El la « pekoj » kiuj estas distingi la individuajn kaj la sociajn. Rilate al la unuaj, mi opinias malfavoraj trudi iun leĝon. Tuj opinias, ke drinki alkoholon malbone, aliaj drinkas kaj estas feliĉaj. Fakte se drinkulo estas fraŭlo, se li drinkas hejme kaj ne ĝenas la najbarojn, li estas tute libera rilate al la socio (1). Ke tiu infano, ke li difektus sian sanstato estas privata afero. Kompreneble estas tendencas malbone taksi malmanon, same kiel iu religulo tendencas taksi la ritojn de aliaj religioj. Je la nomo de homa libereco, mi komprenas ke iuj estas kontraŭ tiu juĝo de la najbaro, sed estas ankaŭ kondutoj, kiuj tute difektas la socian vivon : se via najbaro bruas malpermesas al vi dormi, se la najbaro detruias vian ĝardenon, se viaj amikoj mensogas al vi por trompŝteli monon... tiam mi opinias ke tia konduto havas la efikon kaj ne plu estas privata afero. Ĉi kondukas al dua demando. *Kiam edu-*

*kanto rajtas juĝi infanojn?* Mi diris ke, en privata vivo, homo estas libera kondukti malbone laŭ la juĝo de la najbaro. Sed ĉu infano estas same libera? kaj ĉu ankaŭ edukisto estas libera? Kvankam edukisto estas pagata de la socio, oni povas konsideri ke li laboras ne por la socio sed por la infano. Labori por la infano estas ne nur lernigi al li la metodojn por legi kaj skribi laŭ sociaj reguloj, sed ankaŭ kondukti laŭ tiuj reguloj. Tial mi opinias ke edukisto devas almenaŭ konsili la infanojn. Ekzemple, se iu manĝas kukjon grandkvante, mi opinias ke la edukisto devas agi antaŭ ol la infano estos malsana. Kial? Unue ĉar la malsano alvenos eble nur dek jarojn poste, due ĉar se oni deziras ke infano elektu inter du kondutoj, estas necese ke li konu ambaŭ. M. BOUTON preferas vivjesan sintenon, sed ĉu sekvi vivdezirojn estas reale la plej bona konduto? Ĉu naturaj impulsoj estas dioj? Tiu elekto estas elekto kiun oni ne rajtas trudi pli ol la kontraŭan. Ke plenkreskulo agu libere, jes. Sed antaŭ infano sensperta kiu ricevas iujn influojn de la strato, de la familio, kial la edukanto estus pasiva? Rilate al socia moralo mi konkludas same. Eĉ se oni prizorgas nur la feliĉon de la infano, estas necese lin prepari al la estonta socia vivo. Se la edukantoj, familiaj aŭ profesiaj, lasas la infanon agi libere en la artefarita socio kiu estas familio aŭ lernejo, la infano riskas poste ricevi de la socio batojn pli viglajn kaj senkompatajn ol tiujn de la edukantoj kiuj amas la infanon kaj deziras ŝirmi ĝin. Tiam la kriterio estas klara, la bona konduto estas tiu kiu estas adaptita al socia vivo (2). Ne temas pri blinda sklavigo al sociaj kredoj, sed en libera socio, oni povas eduki la infanon por ke li, ekzemple, ne mensogu. (Komprenable, estas alia problemo en socio kie diktatora reĝimo devigas mensogi por savi la vivon).

Kiam la edukanto rajtas juĝi la konduton de infano, ĉu estas oportune konigi tiun juĝon al la infano mem? Tiu situacio similas al tiu de kuracisto antaŭ malsanulo : ĉu li devas klarigi la gravecon de la malsano? Tio dependas de la cirkonstancoj kaj de la individuaj karakteroj. Tuj bezonas helpon, precipe la timemuloj kiuj ne kuraĝas ion entrepreni, kiuj dubas pri si. Al tiuj oni ne devas anonci malfavorajn juĝojn kiuj riskus malesperigi ilin kaj nuligi ilian psikan forton. Sed aliaj estas memfiduloj, kiuj kredas sin la plej kapablaj kaj tendencas trudi al la najbaroj siajn dezi-

(1) Jes, sed kondiĉe ke li rezignu generi infanojn. — Red.

(2) Ĉu do ni plene akceptu la proverbon : « Inter lupoj, bleku lupe »? — Red.

**SEKVA NUMERO  
EN OKTOBRO**

rojn. Tiuj bezonas bremsojn, avertilojn; la vero eĉ malagraba estas utila. Kelkaj infanoj suferas, ĉar ili timas esprimi siajn dezirojn, sed oni devas ne forgesi tiujn, kiuj tuj kaptas la plej dikajn kukon, batas la frate-ton... ktp. ili havas nature vivjezan sintenadon, eĉ se ili neglektas la vivezirojn de la aliaj.

Mi parolis pri anonco de la malsano, sed la plej grava ago estas kuracado. En edukado morala, la problemo estas: *kiel influi sur la konduto?* Iuj opinias ke oni devas lasi la naturon agi, kaj ne malebligi sian efikon, sed tiu negativa sintenado, ne ŝajnas al mi meriti la nomon edukado.

La metodo kiun mi preferas certe najbaras tiun de R. ROSSETTI. La edukado estas kompleta pri iu punkto. kiam la infano akceptas libervole kun amo dankema la konsilojn de la edukanto. Tio supozas ke la infano rajtas diskuti, kritiki, eĉ ribeli, kiel diras R. ROSSETTI. Tiun metodon mi nomus volonte *persuado*. Ĝi taŭgas, kiam la edukisto estas valora, sed ankaŭ kiam la edukoto (infano aŭ ne) estas sufiĉe raciema kaj ne havas tro grandajn pasiojn. Post ribelo, diskuto kongruanta kun socia vivo. Se la edukoto estas tro pasie aŭ tro subjektiva, la plej bonaj konsiloj restas eksteraj al li, la ribela sintenado daŭras kaj la infano restas pli malpli kontraŭ la cetero de la homaro. Ĝi estas nek adaptita al homa socio, nek kapabla kondukti sendepende de siaj deziroj; ĝi ne estas libera. Konklude mi diros ke mi dezirus ĉiam uzi tiun metodon sed mi speritis ke ĝi ne valoras en ĉiuj cirkonstancoj.

Alia rimedo estas la *ekzemplo*: la infano imitas la edukiston, kiun li admiras. Tiu metodo estas rekomendinda, kiam ekzistas natura simpatio inter la edukanto kaj la lernanto; ĝi plaĉas al la virinoj, kiuj ĝenerale ne havas grandan inklilion por la antaŭe citita metodo. Kompreneble, sur la natura simpatio devas esti kulturata pli aktiva amo kiu fontas el la solidareco de komuna laboro, el sindonemo de la edukisto. Tiu agado povas kompletigi la antaŭan; ĝi agas kiam la raciaj argumentoj perdiĝas en nuancoj de la sentoj. Oni povas kompari ĝin al religio dum la unua estas pli scienca.

Bedaŭrinde, ne ĉiuj infanoj estas raciemaj kaj ne ĉiam estas simpatio inter lernanto kaj edukisto. En tiaj pli malfavoraj kazoj, restas armiloj por morala edukado. Se la infano estas morale malforta (aŭ psike malforta), se ĝi timas ne nur antaŭ la edukisto, sed antaŭ la vivo-problemoj, se tiu infano estas tiel mallerta ke ĝi maskigas kompaton sed ne simpatian varman en la koro de la edukanto, tiam mi proponos la *sugestitan metodon* de M. BOULTON. La plej inda ekzemplo estas tiu de la bubo, kiu mantenas porcelanaĵon. La patrino ne povas diskuti kun la bubo, ŝi tro timas la falon por simpatii kun la ludo infana, tiam ŝi sugestas: « donu al la patrino ». Sed tiu metodo sukcesos nur se la edukato fidus la parolojn de la edukisto se ĝi sentas sin malforta kaj blinde kredas la falsajn laŭdojn. (« Vi eraris sed vi estas inteligenta, vi povas fari pli bone »). Multaj francaj knaboj dirus en tiaj cirkonstancoj: « Le vieux se fout de moi ou il est tombé sur la tête », slanga esprimo signifanta proksimume: « La maljunulaĉo primokas min aŭ li frenezigiĝis ». Tial, eĉ tiu metodo, pli modesta ol la du unuaj, estas ne universala.

Iuj infanoj estas neraciemaj, ne simpatias kun la edukisto, ili sentas sin fortaj kaj fidus pli en siaj kapabloj ol en la helpo de la aliaj. En iu difinita kazo, ili vidas solvon, kiu plaĉas al ilia intereso kaj tuj impetas en tiun konduton, spite al la cetero de la mondo. Ne plu estas la kazo de la bubo kun porcelanaĵo, sed de iuj junuloj (kiujn mi konis - ne estas teoria kazo) kiuj intence frakasis per ŝtonoj la fenestrajn vitraĵojn de tuta domo. Kiam por ludi homo forbruligas siajn monbiletojn, oni povas diri ke li estas libera, sed kiam li bruligas tiujn de la najbaro, kiu sugesto tiam taŭgas? Ĉu oni povas kalkuli pri simpatio? Eble, sed mi ne kredas ke centprocente, kaj tuj, tiu solvo efikas; en la aliaj kazoj, kion fari? Diskuti? La ribelantoj klarigos ke vivo estas ĝuo, ke ili deziras tiun ĝuon, kaj ke la aliaj devas mem zorgi pri si: « Ĉiu por si, Diabolo por ĉiuj ». Tiu vivkoncepto kiu neas moralon havas sian logikan forton kaj mi ne kredas ke per frazoj oni povas bremsi tiun egoismon. Puno, tiam, estas rimedo por montri ke super la persona egoismo estas la socia. Morale, ĝi ne valoras pli, sed praktike ĝi estas forto kiu ŝirmas kontraŭ la perfortuloj. Al puno de aŭtokrata instruisto, mi preferas la decidon de klasa tribunalo, sed ĉiukaze estas puno. Ĉiukaze la vivjesa deziro de iu estas bremsata. Iuj opinias tiun bremsadon katastrofo laŭ principoj noblaj; laŭ mia sperto mi respondos: *tiu dependas de la cirkonstancoj*.

Eduko estas malsimpla problemo, ĝi devas trovi sukceson tra duobla adaptiĝo, de la edukanto kaj de la edukato. Iuj metodoj sukcesas kun iuj lernantoj, sed ne kun la aliaj. La metodo de M. BOULTON supozas fidon al la edukistino (persone mi ne kredus) kaj la rimarkoj de R. ROSSETTI pri la rajtoj de la infanoj estas fakte limigitaj en la socia vivo.

F. BOYET.

## Lastminute

◆ EL VASVAR, HUNGARIO. D-ro Kondor Jozsef skribas ke li jam tradukis hungaren la artikolon de Marjorie BOULTON: « Sugesto en la Klasĉambro » kaj esperas publikigon en la oficiala pedagogia gazeto. Se eble li sendu al ni du provekzemplerojn. Sukceson!

◆ EL PIRNA, ORIENTA GERMANIO. Nia korespondanto kolektis so adresojn de novaj kaj malnovaj esperantistaj kolegoj. Ĉiuj kune ili strebas atingi oficialan permeson: tiu ebligas al ili instrui jam en pli ol 20 lokoj. Gratulojn kaj sukceson!

◆ EL ZAGREBO, JUGOSLAVIO. « *Školske novine* » (n° 24) raportas pri konferenco de instruistoj esperantistoj (10 Jul 56). Estis fondata Sekcio de instruistoj kaj profesoroj esperantistoj en la kadro de kroatia Esperanto-Ligo. Regularo adaptita et de ILEI. Petskribo pri Esperanto en la lernejojn sendita al « konsilantaro por klerigo ».

Ni gratulas nian kunlaboranton, Francisko NOVLIJAN emerita gimnazia direktoro (Baldiceva 9-a, Zagrebo) kiu elektigis Prezidanto. Sukcesojn al la nova « Sekcio ».

INFORMOJ (fino de p. 74)

objektojn. La lernejo jam posedas riĉan muzeon tiel kolektitan.

En « Sloga » (Konkordo) n° 10 (15 Svibnja 56) p. 12-13, B. Pipinic pritraktas la saman temon sub titolo « Karaj gramikoj » (Ses ilustraĵoj).

Ambaŭ gazetoj el Zagrebo.

« NOVAJ GRAJNOJ EN VENTO »  
Gojiga letero el Nederlando

« Mi vidis vian interlernejan ĵurnalon « Grajnoj en Vento » kaj tio kaptis min tiel, ke mi decidis peti informojn pri ebla nova rondo. Mi estas esperanto-instruisto en la porinstruista seminario en Beverwijk kaj mi volus informiĝi, ĉu estus eble formi seminarian rondon. Niaj lernantoj, ĉiuj estontaj instruistoj, estas 15-20 jaraĵoj kaj certe ĝoje kunlaborus.

« Eble vi povus verki on pri tiu ĉi propono en iu pedagogia revuo aŭ sciigi al mi, kiamaniere mi povus atingi alilandajn porinstruistajn seminariojn. »

H. F. van DENZEN,  
Bissch. Kweekschool  
Romerkerweg 10.  
Beverwijk (Nederlando).

Volonte mi verkas tre mallonge, insiste petante gesamideanojn — instruistoj kaj profesoroj en seminarioj — tuj kontakti kun s-ro van Denzen por baldaŭa starigo de rondo kun eldono de gazeto interlerneja. Tre ĝojiga estas la fakto, ke estontaj geïnstruistoj el multaj landoj interŝanĝos siajn sper-

ojn kaj ideojn per Esperanto. Post nemultaj monatoj jam funkcios tri rondoj interlernejaĵoj : *Bienne/Svislando, Zagreb/Jugoslavio, Beverwijk/Nederlando.*

Kaj nun, kiu anoncas sin por kvara rondo ?

Mi kaptas la okazon danki la redakcion pro tio, ke ĝi tiel afable malfermis siajn kolonojn por niaj alvokoj kaj la aperigo de la adreso de la interesuloj.

*Bienne/Biel, Svislando.*  
M. ERBETTA,

LA JUNA VIVO

Restas stoko de 12.000 ekzempleroj (1934-1939) de tiu bonega gazeto porinfana (10-16-jara). Ekzistas ankaŭ binditaj jarkolektoj. Ĝi entenas diversajn rakontojn por infanoj el diversaj lingvoniveletoj, ludojn, kantetojn kun muziknotoj, enigmojn, kursojn, ilustraĵojn. Ni tre konsilas mendon ĉe la diversaj libroservoj aŭ rekte ĉe la redaktintino : S-ino E. Van VEENENDAAL-BOUWES, *Limmen (N.H.) Nederlando.*

INSTRUISTA LETERO

la organo de I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), estas intima ligilo inter geïnstruistoj tutmondaj, eldonata de S-ro SVANTESSON, Skonertgatan 1, *Goteborg, vr., Svedujo.* Oni abonas por SERIO da dek sinsekvaj numeroj. Abonkosto : 4 svedaj kronoj, aŭ 275 francaj frankoj. Peranto en Francujo : S-ro Odent, 46, rue Rouget-de-l'Isle, *Calais.* Poŝta ĉek-konto : Lille N-ro 1 437-63.

# Pri la plena Vortaro

*Sekve de la recenzo de Plena Vortaro en la Decembra n° de « Esperanto et Culture » ni ricevis la jenajn notojn de Prof. G. WARINGHIEN. Ili certe per si mem interesos la leganton.*

Mi dezirus fari kelkajn rimarkojn pri la tre bona kaj dankata recenzo, kiun D-ro ALBAULT dediĉis al la P. V.

« Gajno surprizas pro sia sono kompare al sia deveno » ; sed la deveno estas ja la latina « vagina » kun la akcento sur la i ; vere estas ke en la itala (guaina) kaj en la hispana (vaina) la akcento deglitis sur la a : sed tion imiti en Esperanto estis neeble, pro la ekzisto de la vorto « gajno ».

La demando pri la *pseudosufikso* (-acio, -ika, ktp.), estas malfacila : ĝi efektive dependas de la pli-malpli granda rapideco de asimiliĝo de ĉiu vorto. Tiuj vortoj eniras la lingvon laŭ la 15-a regulo, t.e. kun sia internacia formo « ekstradicii, hermetika, antibiotiko », ktp. En la okazo, kiam ili estas sufiĉe ofte uzataj, oni sentas la pezon de la pseudosufikso kaj oni iniciatas sensufik-

san formon ; sed la sukceso dependas ne de la logiko, sed de la ĝenerala uzado. Ekz-e, kvankam la ideo mem estas tute simpla kaj komuna, la nuda formo « konverso » ankoraŭ ne anstataŭis la oficialan « konversacii ». La vortaristoj devas do sekvi la uzadon, eĉ se ili preferus pli logikan disvolvigon.

Aliflanke, mi opinias, ke oni devas diri « neolitiko » ktp., ĉar en kelkaj tiaj vortoj, la senco de la greka vorto « lito » (= ŝtono) estas ankoraŭ sentebla : la fakuloj parolas pri oolitoj (t.e. pri ŝtonoj, ne pri epokoj), pri aerolito, monolito, ktp. Por eviti konfuzon, oni devas uzi ĉe la periodnomoj la pseudosufikson -iko.

Mi plene konsentas kun D-ro ALBAULT pri « *islamano* » prefere al « muzulmano », kaj pri liaj konsideroj rilate al la *tiel nomataj poeziaj vortoj*. Estas malofta okazo legi ion saĝan kaj senantaŭjuĝan pri tiu temo.

Prof. G. WARINGHIEN.

# KONKURSO

## 7-a KONKURSO

Gajnintoj : S-ro Bonamy, F-ino Chatelain, S-ro Chazal, S-ro Couwenberg, Dr Jaromir Jermar, F-ino Joubert, S-ino Lemoine, S-ino Pallard, S-ino Reyneau gajnis 2 poentojn.

Ni gratulas ĉiujn.

## 8-a KONKURSO

Jen la solvo :

Horizontale : 1. Grumblulo ; 2. Lari-ko ; 3. Te, laro, ro ; 4. Alo, ko, ten ; 5. Perko, ergo ; 6. Egal, unuig ; 7. Rit, on, dor ; 8. Ko, bruo, na ; 9. Dolori ; 10. Monoplano.

Vertikale : 1. Gutaperko ; 2. Elegio ; 3. Ul, orat, do ; 4. Mal, kl, bon ; 5. Brako, orlo ; 6. Liro, unuop ; 7. Uko, en, orl ; 8. Lo, trud, ia ; 9. Region ; 10. Monogramo.

Gajnintoj : F-ino Arnould, S-ino Beil-lier-Bizot, S-ro Bourry, F-ino Chatelain, S-ro Chevalier, S-ro F. Couwenberg, F-ino Forest, Dr Jaromir Jermar, F-ino Joubert, Ges-roj Lanz, S-ro Le Seac'h, S-ro Letendre, S-ino Pallard, S-ino Reyneau, S-ino Robin, S-ro A. Scholtz, F-ino Texier gajnis 2 poentojn.

S-ro Génuit, S-ro Le Coze, S-ino Rosenstengel, S-ino Villette gajnis 1 poen-ton.

Ni gratulas ĉiujn.

## 10-a KONKURSO

1) Eltrovu 21 vortojn, kies difinoj estas :

1° Spiralforma ornamaĵo ; 2° Nazmal-sano ; 3° Arto trafte paroli ; 4° Ceremo-nia vira vesto ; 5° Ripozejo ; 6° Raba amerika katparenca besto ; 7° Pinta metala bastoneto ; 8° Traklarĝo ; 9° Vojetto

en kamparo ; 10° Procedo de vendo ; 11° Provizora regnestro ; 12° Arbusto kun ilavaj floroj ; 13° Ataki la unua ; 14° Senmotora aviadilo ; 15° Muzika teatra-jo ; 16° Konforma kun la leĝo kaj juro ; 17° Fiŝkaptilo ; 18° Ekstrakvalita ; 19° Flugaparafo ; 20° Tre malgranda birde-to ; 21° Orkestra peco.

2) Elprenu el ĉiu trovita vorto la unuan literon, kaj formu, laŭ la nume-rita vico, malgrandan frazon, kiu estu Esperanta kondutgvido.

Por bona respondo vi ricevos 2 poen-tojn.

Sendu viajn respondojn ĝis la fino de la venonta monato al S-ro Guilot, Cours de la 4<sup>e</sup> République, Gaillard, Hte-Savoie (Francujo).

*Dankesprimo* : ĉar tiu-ĉi numero estas la lasta de 1955-1956, mi kaptas la oka-zon por saluti ĉiujn partoprenantojn, ilin danki pro ilia fidelo, kaj pro la afa-blaj vortoj, kiujn ili ofte aldonas por la korektanto. Specialan saluton mi sendas al niaj gesamideanoj el Belgujo, el Ce-hoslovakio, el Germanujo, el Italujo, kiuj entuziasme partoprenas la konkurson, kaj ankaŭ aldonas amikaĵojn al sia respondo.

Al ĉiuj, bonajn feriojn... eble en Gré-sillon !

— Mi memorigas al niaj eksterlandaj abonintoj, ke la regularon de nia konkurso oni trovas en la januara numero. Por ricevi ĝin, oni sin turnu al S-ro Bidoit, en Baugé (Maine-et-Loire).

— Al ĉiuj, mi memorigas, ke ankaŭ por la elekto de la premiaj libroj oni sin turnu al nia S-ano Bidoit.

## POR VIA DISTRO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2					■	■				
3				■				■		
4			■						■	
5		■								■
6		■								■
7			■							■
8				■				■		
9					■	■				
10										

KRUCVORTOJ N° 6

Vertikale :

1. Doktrino, kiu akceptas kiel kriterion de l'vereco nur la praktikan valoron.
2. Inverse : konforma al la regulo de la beleco ; grasa fluaĵo.
3. Posesivo ; fonetike : malgloro ; fone-tike : altestimo.

4. Fonetike : frukto ; moviĝos ; inverse : bildo.

5. Subtera ĉambro de preĝejo.

6. Hakilo.

7. Pronomo ; larĝa streko (r) ; prepozicio.

8. Preni ion kiel rimedon por atingi celon ; du samaj vokaloj ; suna lumo (r).

9. Alkala bazo ; senti impreson de surprizo.

10. Karaktero de io bone adaptita al sia destino.

Horizontale :

1. Speco de dikŝela oranĝo.

2. Inverse : episkopa ceremonia kapves-to (r) ; inverse : afekti gravan nenion.

3. G. de papagoj (r) ; fonetike : honto ; filo.

4. Inverse kaj fonetike : eksterigo de ka-pabloj ; funkcios ; fonetike : bonega afero.

5. Subtera ĉambro de preĝejo.

6. Hakilo.

7. Inverse : participa finaĵo (r) ; larĝa streko (r) ; fonetike ĉ pagilo.

8. Instrumento ; du samaj vokaloj ; en tiu loko.

9. Konscii pri io (r) ; la personigita morto.

10. Scienco pri la formo de vortoj.